

Arthur kaj Heidi Baur kun Claude kaj Andrée Gacond:
Konversacio de la esperanto-parolistoj de SRI (2. Arthur Baur-Andrée Gacond)
SRI-122-2-772-1984

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-122/SRI-122-2-772-1984-Arthur-Heidi-Baur-Claude-Andree-Gacond-Konversacio-de-la-esperanto-parolistoj-de-SRI-2.mp3>

CG.- Refoje grupiĝis la kvar kunlaborantoj de la Esperanto-fako de Svisa Radio Internacia por daŭrigi la reciprokajn intervjuojn. Nun mia kolego Arthur Baur intervjuas mian edzinon.

AB.- Sinjorino Andrée Gacond, ĉu vi povas rapide prezenti vin mem ?

AG.- Mi estas franclingva svisino kaj naskiĝis en la Chaux-de-Fonds, urbeto kun trideksesmil loĝantoj, situanta en la Ĵurasa montaro. Tial mi ŝatas la neĝon, la skiadon kaj glitŝuadon sur glaciitaj riveroj.

AB.- Jes, vi loĝas en bela regiono. Lastan fojon ni aŭdis, kiel konatiĝis s-ino Heidi Baur kun Esperanto. Kiamaniere vi konatiĝis kun Esperanto?

AG.- Kiel s-ino Baur, mi konatiĝis kun Esperranto pere de lernejkamarado. En la porinstruista lernejo de neuchâtel, mia tiam estonta edzo donis al mi la libreton «Esperanto por infanoj», kiun mi trastudis kun amuzo. Mia perlibra studo proksimume limiĝas al tio. Poste mi praktikis la lingvon.

AB.- Sed kiamaniere vi poste tamen lertiĝis tiel, ke vi nun povas tute libere paroli kun mi?

AG.- Mi lertiĝis feriante kun esperantistoj. Tuj kiam mi gajnis monon, mi partoprenis en feriosemajno en Konstanz. Tie mi konstatis, ke mi malbone povis paroli, sed surprize bone komprenis, kiam mi streĉe atentis. Mia estonta edzo ekorganizis semajnfinojn kadre de la Svisa Esperantista Junularo. Tie ni multe ridis kaj iomete lernis. En La Chaux-de-Fonds okazis kelkaj grupaj kunsidoj estritaj de 90-jara esperantistino, s-ino Marie Wolf. Kun ŝi mi multe laŭtleĝis kaj akiris korektan esperanto-akcenton, almenaŭ mi esperas.

AB.- Certe, certe.

AG.- Sed la vera esperanto-lernejo estis por mi la esperanto-skiferioj en Adelboden. Tie mi devis akiri la vortaron por la ĉiutaga vivo. Mi lernis nomi la kuirejajn objektojn, la diversajn legomojn, la spicojn, ni eĉ devis forĝi al ni ski-vortaron: ‘kristjaniĝi’, ‘ŝtemi’, ‘jori’, ‘valeni’. Ĉu tiuj vortoj troviĝas en la PIV, mi ne scias.

AB.- Ankaŭ mi ne, sed almenaŭ vi ne nur lernis Esperanton tie, sed ankaŭ skiadi, ĉu ne?

AG.- Oh, skiadi mi jam sciis, fakte.

AB.- Vi jam sciis antaŭe, ĉar vi loĝas en la montaro.

AG.- Ĝuste.

AB.- Ĉu vi ĉiam loĝis en La Chaux-de-Fonds?

AG.- Ne. Mi edziniĝis en 1958 kaj ekloĝis en najbara vilaĝo, La Sagne. Tie esperantistoj venis viziti nin. Mi ĉiam konservis dubon pri la taŭgeco de Esperanto por renkonti ekster-eŭropajn homojn. Kiam anonciĝis ĉe ni la unua japanino, mi postulis, ke mia edzo ĉeestu la unuan momenton ĉar mi timis ne kompreni ŝian esperanton. Sed tuj evidentiĝis ke la lingvo glate funkcias kaj dum ŝia unusemajna restado ni terure multe babilis.

CG.- Jes, kaj mi eble aldonos, ke la unuan matenon, kiam mi alvenis por tagmanĝi, ili ankoraŭ estis ĉe la tablo de la matenmanĝo forgesinte la tempon-fluon, ĉu ne?

AB.- Kaj babiladis kaj babiladis.

CG.- Jes, jes, do bone sukcesis.

AB.- Vi faris la saman sperton, kion ankaŭ aliaj jam faris kun malproksimumoj, kiuj tamen same bone parolas Esperanton kiel ni, aŭ eble eĉ pli bone. Do, ni daŭrigu! Via edzo ja estas la direktoro de la Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds. Pri tio ni aŭdos ankoraŭ ion intervjuante lin. Ĉu vi kunlaboras en ĉi tiu instituto ?

AG.- Unue mi devis akcepti tiun situacion, kiu estas iom aventureca: redukti nian salajron, riski aĉeton de domoj, kiuj devas rentumiĝi – estas iom timiga. Aliflanke, mi kunlaboras, sed limigas la tempon de la kunlaboro. Mi ne volas fariĝi obsedita de Esperanto. En Kultura Centro Esperantista mi donas unu posttagmezon ĉiusemajne kaj zorgas pri la mendo de libroj novaj kaj mankantaj en nia ordinara stoko. En Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la Urba Biblioteko mi laboras unu matenon ĉiusemajne. Tie mi rimarkis, ke mi vere malbone elektis mian profesion. Anstataŭ instruistino, mi devus fariĝi bibliotekistino. Tie mi donas meznombre unu posttagmezon ĉiumonate por legi kun mia edzo la radioelsendojn, kiujn li verkas.

AB.- Vi ĵus diris ‘instruistino’, do tio estas via fundamenta profesio, ĉu ?

AG.- Jes, fakte mi sekvis la unuagradan lernejon en La Chaux-de-Fonds, abiturientiĝis en La Chaux-de-Fonds kaj poste sekvis la porinstruistan lernejon en Neuchâtel.

AB.- Kaj vi havis klasojn?

AG.- Jes, mi instruis dum kvar jaroj kaj duono.

AB.- En La Chaux-de-Fonds?

AG.- En La Sagne kaj en La Chaux-de-Fonds.

AB.- Do, krome apud viaj dommastrinaj okupoj, kiuj ankaŭ koncernas certgrade la Kulturan Centron, kio estas viaj ŝatokupoj aŭ hobiaj kromokupoj?

AG.- Kiel mi diris komence, mi ĉiam ŝatis skii kaj glitiŝui, kiam la rivero Doubs frostiĝas. Dum somere mi ŝatas promeni piede en nia Ĵurasa regiono. Kaj ankaŭ en la Alpoj. Sed mi ankaŭ komencis ludi bekfluton kaj tiu okupo prenas iom post iom ĉiam pli da tempo. Mi posedas tutan familion da bekflutoj de la basa ĝis la sopranina. Oni eĉ petis al mi doni lecionojn en la muziklernejo de La Chaux-de-Fonds. Mi ankaŭ tre ŝatas legi, ĉu en Esperanto

ĉu - kaj ĉefe - en la franca. Alia tre ŝatata okupo estas niaj ferioj libere tra Eŭropo en nia dormaŭtomobilo. Dum tiuj vojaĝoj ni aĉetas poŝtkartojn pri la belaj folkloraj kostumoj de la trapasitaj regionoj.

AB.- Vi parolis de la fluto. Ĉu vi ankaŭ estas membrino de orkestro en La Chaux-de-Fonds ?

AG.- Ne, ĉar en La Chaux-de-Fonds ne ekzistas orkestro kun barokaj instrumentoj. Bekfluto estas historia instrumento kaj estas sufiĉe, ankoraŭ nun, malofte ludata. Sed mi ek-komencas partopreni ekzemple en ludado kvarope aŭ kvinope.

AB.- Do, estas tasko por la estonto fondi orkestron tiaspecan en La Chaux-de-Fonds.

AG.- Mi ĉiam timas esti fondinto de io, ĉar mi ne estas sufiĉe dinamika persono.

AB.- Jes, kaj estas ankaŭ administra kaj organiza laboro. Kaj viaj libertempaj vojaĝoj, kien ili kondukis vin ĝis nun. Kaj ĉu Esperanto ankaŭ ludas rolon en ili ?

AG.- Jes, kelkfoje Esperanto ludis rolon. Ni faris, kiel gesinjoroj Baur, ankaŭ vojaĝon, prelegvojaĝon, sed ni en Anglio. Ni iris al Anglio, al Londono. Loĝis ĉe fervojistoj tre interesaj, SAT-anoj kaj sindikalistoj kaj ni multe diskutis pri la svisa organizo politika kaj ili multe miris pri nia sistemo, kiu estas proporcia sistemo. Ili tute ne povis kompreni pri nia...

AB.- Ĉu ili ankaŭ miris, ke ni ne havas prezidanton..., ili havas reĝinon ?

AG.- Jes ĝuste pri tiaj aferoj ili tute miris. Kaj dank al ili, dank al la filino de tiuj personoj ni tre bone vizitis Londonon. Poste ni iris al iom pli norda regiono, ĉe Halifax kaj tie ni prelegis. Vizitis la vilaĝon de la fratinoj Bronte, kaj vidis ke la pejzaĝo multe ŝanĝiĝas, estis printempe kaj la herbo estis apenaŭ kreskanta ĉe la nordo kaj jam multe da floroj estis en Londono. Poste ni iris ankaŭ en la suda parto de Anglio ĉe la regiono de Bristol, kie ni retrovis svisinon, kiu estis ano de la junularo esperantista kiam ankaŭ ni estis junaj, kaj ni havis multe da plezuro trovi nin. Ŝi estis edziniĝinta kun anglo.

AB.- Tiam vi ja estis ankoraŭ tiel juna ke vi apartenis al la svisa esperantista junularo, ĉu ni povas diri tion?

AG.- Ne, kiam ni vojaĝis al Anglio ni jam maljuniĝis, sed ...

AB.- Sed antaŭe vi...

AG.- Antaŭe ni partoprenis en la svisa esperantista junularo.

AB.- Vi ja scias, ke nun la junulara organizo estas refondita, kiel, ĝi havas la belan nomon, 'JES', Junularo Esperantista Svisa.

AG.- Jes, mi aŭdis pri tio, ili kunvenas ofte en la Kultura Centro Esperantista kaj tiel mi scias

AB.- Nu, bone. Mi multe dankas al vi pro viaj viglaj respondoj kaj mi anoncas al niaj geaŭskultantoj ke ni daŭrigos tiun intervjuadon proksiman fojon. Ĝis reaŭdo!